

katolika sento

5

JARO 54a

U.E.C.I.



75



KATOLIKA SENTO

BOLLETTINO DELLA
UNIONE ESPERANTISTI
CATTOLICI D'ITALIA
(U.E.C.I.)



Anno 54° - 1975

Autorizzazione Tribunale
di Milano N. 6536 del 6.4.1964

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (MI)

Redattore per la
Voce Esperantista di Roma:
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA
Poŝtĝirkonto 1-37638

Redattore
del Bollettino U.E.C.I.:
SIG. GLAUCO CORRADO
Via Palmanova 28
20132 MILANO

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO
Poŝtĝirkonto 3-7791

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

ABONKOTIZON
AL KATOLIKA SENTO
SACERDOTOJ POVAS PAGI
ANKAŬ PER CELEBRO
DE DU S. MESOJ,
PRI KIUJ ILI BV. INFORMI
P. JACOBITTI
AŬ PASTRO DUILIO MAGNANI
VIALE C. ZAVAGLI 73
RIMINI

Quota di abbonamento L. 2500

Abonkotizo italliroj 2500

KATOLIKA SENTO

n° 5

54^a Jaro

Majo 1975

MATER DOLOROSA

Ho, lanc' de l' mornaj turmentantoj
Ne plu minacas, la danĝera.
Jen, Via kor' Fil' trapikita,
Ĝin larmoj ne plu viva faros,
De l' mort' ne savos ĝin, sencelaj.

Ho, ŝajnas, Fil', ke Via amo
Ne plaĉas al vanteco blinda
Kaj tial oni Vin krucumis.
Ho diru, Fil', ĉu ankaŭ tio
Estas, finfine, pardoninda ? -

Malvarmas, manoj, korpo Via,
Nur vangoj Viaj brilas, rave.
Ĉu Vi per am' eĉ morton venkos
Por ŝarĝon de la homaj pekoj
Sur sin transpreni, homosave ?

Jozefo Rijeĉanin

NIA SINJORINO DE LA ESPERO EN KATALUNIO

o o o o o o o o o o

Antaŭ 63 jaroj, en decembro 1962, la tiama KATALUNA LIGO DE KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ, landa ligo de IKUE (en 1912 la landaj sekcioj estis sep: Angla, Belga, Franca, Germana, Hungara, Kataluna, Nederlanda), celebris sian unuan jarfeston honore al la Patronino de la Ligo, Nia Sinjorino de la Espero.

La "Kataluna Ligo de Katolikaj Esperantistoj" estis fondita la 6-an de marto 1911 en Barcelono. La Barcelona episkopo ĝin aprobis, kaj poste la tuta kataluna episkoparo (8 diocezoj) bonvole akceptis la honoran prezidantecon. La oficiala organo de la Ligo estis KATALUNA KATOLIKO, ĉiumonata presita bulteno, kies unua numero aperis en aprilo 1911. En la oficiala regularo (ĉapitro 1, art. 4) oni deklaras Nian Sinjorinon de la Espero Patronino de la Ligo.

La festo de Nia Sinjorino de la Espero estas celebrata, laŭ multjarcenta tradicio de la hispana kalendaro, la 18-an de decembro, 7 tagojn antaŭ Kristnasko. La oficiala latina titolo mezepoka estis "In expectatione Partus B.M.V.". Sed populariĝis la titoloj "Nia Sinjorino de la O" (pro la komenca litero de la solenaj vesperaj antifonoj en la lastaj tagoj de advento) kaj "Nia Sinjorino de la Espero".

En 1912, la 15-an de decembro (kiu estis la dimanĉo proksima al la festo), la katalunaj IKUE-anoj kolektiĝis grandnombre en la urbeto Barberà del Vallès, apud Sabadell. Tie la paroĥestro, pastro Jozefo Planas, celebris la solenan meson, kaj pastro Joakimo Coll (profesoro de Esperanto en la Barcelona Universitato) predikis; laŭ la tiutempaj raportoj, li klarigis kial "nia Ligo elektis la Sanktan Virgulinon de l'Espero kiel Patro

ninon". La kanthoro de la Katolika Akademio de Sabadell kantis la meson "Te Deum laudamus" de Perosi. Poste okazis procesio ĉirkaŭ la preĝejo. Tagmeze oni partoprenis fratan kunmanĝadon en Sabadell, kaj fine, en la festsalonego de la Katolika Akademio, okazis literatura kaj muzika festo. Mi ŝatas mencii, ke unu el la paroladoj en Esperanto faris D-ro Johano Buxò, tiama kuracisto, kiu poste sacerdotiĝis kiel Klaretana Misiisto kaj mortis kiel martiro dum la revolucio en 1936.

Pastro Jozefo Planas (1861-1929) estis unu el la plej agemaj kaj fervoraj esperantistoj en tiu epoko. Li estis fondinta en Barberà del Vallès, jam en 1908 kaj sub la patroneco de Nia Sinjorino de la Espero, lokan societon "Esperanta Nesto", kiu kune kun la Sabadell-a "Katolika Stelo" (fondita en 1910) organizis tiun unuan oficialan jarfeston de la Kataluna Ligo de Katolikaj Esperantistoj honore al Nia Sinjorino de la Espero antaŭ 60 jaroj. Kiel sciante, estis ankaŭ li kiu, unu jaron poste, okaze de la 4-a Internacia Kongreso de IKUE-en Romo, proponis, la 7-an de septembro 1913, ke Nia S-ino de la Espero estu la Patronino kaj Protektantino de ĉiuj katolikaj esperantistoj. Sed tion oni celebros ekde la posta jaro.

Manuel Casanoves, CMF.

.....
 : GRAVA ATENTIGO ! Ĉiu aliĝinto al la Kongreso bon- :
 : volu afable kaj plej rapide inĉikiai ni: 1) la precizan an- :
 : taŭviditan tagon de sia alveno; 2) ĉu li volas loĝi en u- :
 : nulita ĉambro de la kongresejo (aldono de £.10.000), :
 : aŭ en dulita - kaj eventuale kun difinita persono; aŭ 3) :
 : aranĝi aliloke sia restadon. :
 : Ni dankas tiujn, kiuj jam donis tiujn informojn. :
 :



Ho nekoruptebla floro kaj sendifekta ĝermo
el la Jesea radiko!

Antaŭ jarcentoj Isaĵo vin proklamis
loĝejo de la Sepforma Sankta Spirito.
Ni gloras vin, virga Dipatrino!

(El la Armena liturgio)

ALIGIS AL LA 36^a IKUE-KONGRESO EN ROMO:

238	Sobczyk L.	248	Danowska J.
239	Kowalski T.	249	Monkiewicz B.
240	Rucinska M.	250	Harris J.
241	Kossakowski R.	251	Borowczyk H.
242	Galiardi I.	252	Birczynski J.
243	Kanczyk R.	253	Sodomska P.
244	Jankowska A.	254	Stryczek J.
245	Wolnomiejska K.	255	Briano G.B.
246	Swiatek J.A.	256	Briano E.
247	Rogowska M.		

Ĝis nun: 256 el 14 nacioj, el kiuj:
 146 el Pollando; 60 el Italujo; 14 el Francujo; 7 el
 Nederlando; 6 el Germanujo; 5 el Hispanujo kaj Ju -
 goslavio; 4 el Hungarujo; 3 el Belgujo; 2 el Aŭstrujo
 1 el Ĉeĥoslovakio, Norvegujo, Usono, Britujo.

Memorindaj estus por nia pilgrimado, vizitoj al kel -
 kaj el ĉi tiuj preĝejoj, kiujn en ĉi tiu numero ni ra -
 pide revuos. Pri la aliaj (pli ol 300!) oni neprene po -
 vas paroli. Sed oni ne forgesu, ke se Romo estas en
 tute muzeo pri artaĵoj, la plejmulto da ĉi tiuj trovi -
 ĝas en la preĝejoj, pravigante la diron, ke la arto, fi -
 lo de Dio, havas sian naturan loĝejon en lia domo mem.

SANKTA LAŬRENCO EKSTER LA MUROJ. Al la gran -
 da diakono de la roma Eklezio estis dediĉitaj multaj

kaj ĉarmaj bazilikoj, kiel S. Laŭrenco ĉe Panisperna , en la loko kie li estis martirigita; S. Laŭrenco ĉe la Fonto, kie estis lia karcero; S. Laŭrenco de Lucina , kie estis la hejmo de li frekventita; S. Laŭrenco en Miranda, kie li estis prijuĝita kaj mortkondamnita. La korpo de la plej fama roma diakono, fajre martirigita sub Valeriano je 10 de aŭgusto 258, estis enterigita en Agro Verano, laŭ la Tiburtina strato, ĉar ĉiuj ekleziaj tombejoj estis konfiskitaj de la imperiestroj. Sed lia tombo fariĝis celo de pilgrimadoj, kaj lia festo akiris la unuan lokon post tiu de la sanktaj apostoloj Petro kaj Paŭlo.

La nuna baziliko (1216) starigita sur la unua (570), funde riparita post la militaj danĝeroj, vidis papon Pio 12an kun sangomakulita vesto dum klopodo helpi al vunditoj en bombado de 19 julio 1943.

La interno de la baziliko kun ĝiaj 22 granitaj kolonoj , kiuj subtenas la grandajn arkitravojn, kun ĝiaj monumentaj kosmataj ambonoj de la 12a jarcento, kun la dukolona presbiterio, kun la karakteriza supra matroneo kaj la mirinda papa katedro mozaikornamita, ŝajnas esti la plej taŭga loko por sin fortiri de la mondo en preĝado kaj kontemplado.

S. PRAKSEDA - La unua preĝejo dediĉita al ĉi tiu sanktulino (fratino de S. Pudenciana, kies patro, senatano Pudento gastigis , laŭ tradicio, S. Petron) estis konata jam en la 5a jarcento. Post detruo okazinta probable pro tertremo, ĝi estis rekonstruigita de Papo Paskalo 1.a ĉirkaŭ la rimarkinda maŭzoleo starigita memore al la patrino de la papo mem, Teodora, en la kapelo de S. Zenono. En ĉi tiu loko estis transportita grandega kvanto da martiraj relikvoj, el pluraj ĉirkaŭurbaj mortintoj forlasitaj. Kaj tiuj relikvoj, gardataj en la kriptoj sub la presbiterio, kune kun antikvaj memoraĵoj

kaj valoraj monumentoj, donas hodiaŭ apartan etoson al ĉi tiu preĝejo.


Ekstere ornamas ĝin kolonoj el nigra granito, kun belaj ionikaj kapiteloj de la 6a jarcento, la skulptita kornico de la portalo kaj ravaj mozaikoj, inter kiuj pri S. Prakseda kaj Sankta Pudenciana; interne, belega estas la tiel dirita "paradiza ĝardeno", tre antikva ekzemplero de kapelo entute tegita per mozaikoj, kun planko desegnita per multkoloraj marmoroj. En ĉi tiu preĝejo oni spertas intense tiun admiron al la martiroj, kiu instigis Praksedan viziti kaj kuraĝigi en la karceroj la kristanojn persekutitajn sub imperiestro Marko Aŭrelio.

VIDINDA PREĜEJO ESTAS S. SABINA (Piazza Pietro d'Iliria - Aventino), fondita de Petro, Iliria sacerdoto, inter 422 kaj 432, honore al la umbria sanktulino, martirigita kune kun sia katekistino Serapia sub imperiestro Adriano. Notinda estas ĝia pordo el cipresa ligno de la unua duono de la 5a jarcento, konsistanta el 18 paneloj skulptitaj. La belega interno trinaŭ estas la unika ekzemplo en Romo de romanka baziliko. La navoj estas apartigitaj per 24 korintaj kolonoj, devenintaj el pagana templo.


LA PANTEONO. Konstruita en 27 a.K. de Marko Agrippa kaj riparita de Domiciano post brulego en la jaro 80, ĝi estas unu el la plej perfektaj kaj bone konservitaj monumentoj de la antikva Romo, origine dediĉita al la sep planedaj diuloj. En 609 ĝi estis konsekrita de Bonifaco 4a al la Sankta Virgulino kaj al ĉiuj martiroj kune, kiel templo iam pagana sed nun kristanigita, gardanta multajn relikvojn de martiroj. La templo konsistas el ronda konstruaĵo kovrita per duonsfera kupolo kun granda cirkla aperturo ĉe la supro. Antaŭ la preĝejo estas pronao kun 16 monolitaj

AL NIA SINJORINO DE LA ESPERO


Gregora melodio




Sal - ve, Re - ĝi - no, kom - pa - te - ma pa - tri - no, vi - vo, dol - ĉe - co,




e - sper' ni - a, sal - ve. Ni vin pe - te - gas, ek - zi - li - taj E - va -



fi - loj. Al vi ni so - pi - ras, ĝe - man - te, plo - ran - te en ĉi ti - u



lar - mo - va - lo. Bon - vo - lu do, ple - dan - ti - no ni - a, la ri - gar - don



kom - pa - to - ple - nan vi - an al ni tur - ni. Kaj Je - su - on,



la be - ni - tan fru - kton de sin' vi - a, mon - tru al ni post



la nu - na ek - zi - lo. Ho mil - da, ho pi - a,



ho dol - ĉa vir - ga. Ma - ri - a!

"La "Salve Reĝino" laŭ la populara gregoria melodio, estas unu el la plej konataj kantoj de la fideluloj al sia ĉiela Patrino. Ĝi bone taŭgos ankaŭ por la preĝo al la Virgulino, kiel kondiĉo de la Jubilea Indulgenco.

kolonoj. En la templo estas sepultitaj krom du italaj reĝoj kaj la unua reĝino, ankaŭ famaj artistoj, kiel Rafaelo.

EN S. PETRO KATENITA (S. Pietro in Vincoli) tro -
viĝas la ĉefverko de Michelangelo, la fortika kaj po -
tenca Moseo, ĉefa figuro en maŭzoleo dediĉita al me -
moro de papo Julio 2a. La tuto devis havi pli ol 40 sta -
tuojn, el kiuj kelkaj estas en Florenco kaj en Parizo.
Fakte la granda artisto, persekutata de daŭraj kont -
raŭstaroj de enviuloj, ne povis fini la gigantan monu -
menton.

TRE INTERESA ESTAS LA PREĜEJO dediĉita al pa-
po S. Klemento (ĉ. 100 p.K.), situanta sur aliade la
4a jarcento, en kiu troviĝas la relikvoj de tiu sankta
papo, la tria post S. Petro. En la sama kripto estas
la Tombo de la apostolo de la Slavoj, Cirilo, pro kies
klopodoj la korpo de papo Klemento, retrovita en la
regiono de lia martireco, la Nigra Maro, kaj solene
portita en Romon, estis honore sepultita en ĉi tiu su-
ba baziliko, iam lia loĝejo.

Multaj valoraj mozaikoj kaj pentraĵoj (inter kiuj de Masaccio) aŭ monumentoj riĉigas la bazilikon S. Klemento, kiu ĉerpis abunde ankaŭ el la suba preĝejo. Novaj elfosaĵoj aperigis sub tiu kripto alian paganan sanktejon dediĉitan al dio Mithra, verŝajne en la domo mem de Klemento, konfiskita kaj cedita al la pastroj de Mithra.

[illegible]

N.B.

En la n°-3, je p.50 en la tria verso de la antaŭlasta strofo oni devas legimoke anstataŭ nokte.

[illegible]

ROMA ESPERANTA VOĈO

n ° 139

UNUA BILANCO DE LA SANKTA JARO. Mons. Antonio Mazza, Ĝenerala Sekretario de la Centra Komitato por la Sankta Jaro, en preskonferenco je la 23a de aprilo donis kelkajn informojn pri la unuaj tri monatoj de 1975 koncerne la Jubileon. Komparante ĉi tiun kun la aliaj, kaj precipe kun la Sankta Jaro 1950, li reliefigis ke, inter la komunaj aspektoj de la jubileoj, evidentiĝas en la nuna, okazinta post jara preparo ĉe ĉiulando, pli granda religia matureco, konvinko kaj seriozeco. Kaj tio, kio povas altiri admiron, estas ke ĉi tiuj aspektoj montriĝas aparte ĉe kvalifikitaj grupoj, precipe junularaj, dum la turismaj, kvankam ekzistantaj, ŝajnas apenaŭ duagrada.

Oni povas aserti, ke la restado de la pilgrimantoj en Romo, meznombro de tri al kvin tagoj, sin dediĉas preskaŭ tute al la fundamentaj jubileaj praktikoj. La kvar plej grandaj romaj bazilikoj kunigas ĉiulandajn pilgrimantojn en la samajn matenajn kaj vesperajn celebradojn. Bela elmontrado de unueco de la kredo meze de la diverseco de landoj kaj de rasoj. Kaj kiam la Papo malsupreniras en S. Petron por la plej solenaj celebradoj aŭ por la aŭdiencoj, ni troviĝas antaŭ giganta Pentekosto.

La "Feregrinatio Romana", la diocezaj kaj naciaj komitatoj kaj vojaĝagentejoj nombris en la unuaj tri monatoj 600.000 pilgrimantojn; sed tiuj, kiuj ne apartenas al grupoj aŭ ne petas helpojn de la romaj institucioj kreitaj por la jubileo, estas samnombraj kaj verŝajne multe pli, kiel montriĝas precipe en la dimanĉoj, en S. Pe

tro kaj en ĝia placo. La ĉeestantoj estas la duoblo aŭ la trioblo de la antaŭviditaj aŭ antaŭanoncitaj.

En la Sankta Jaro de 1950 dum la unuaj tri monatoj, la pilgrimantoj estis preskaŭ 200.000. La ĉijaraj aŭdiencoj de la Papo havis eksterordinaran kreskon. Oni atingis la nombron de pli ol 300.000 ĉeestoj, tiel ke oni devis organizi tri grandajn aŭdiencojn samtage en tri malsamaj lokoj. Kelkfoje oni havis aŭdiencojn aŭ papajn celebradojn en la placo S. Petro. La plej granda parto de la pilgrimantoj post la gajno de la jubilea indulgencoj forlasas Romon, kaj inter ili ankaŭ la grandaj junularaj pilgrimadoj. Oni povis konstati ĝeneralan malpliigon de la riĉa turismo, kaj grandan kreskon de la romaj pilgrimantoj ĉe la pli modestaj klasoj, kiel tiuj de laboristoj kaj studentoj. Kvankam oni pretigis loĝejojn por pli ol 8000 personoj ĉiutage, tiuj lokoj estas jam elĉerpitaj dum la venontaj monatoj de la Sankta Jaro. Pro tio oni estas devigataj apartigi grupojn kelkfoje eĉ plurajn kilometrojn for de la Urbo.

INTER LA CENTOJ DA PILGRIMANTAJ GRUPOJ, kiuj venis al Romo por la gajno de la Jubilea Indulgenco, ni volas mencii nur kelkajn, kiuj plej trafis nian atenton. El ili unu el Tokio, 55 inter viroj kaj virinoj, ĉi tiuj laŭstaj kun la graciaj kaj ravaj kostumoj kaj harplektadoj. Dum sia aviadila pilgrimado ili vizitis ankaŭ la Sanktan Landon: Jerusalemon, Betlehemon kaj Nazareton. Multaj el ili ricevis la baptan kiel plenaĝaj; sep el ili de malmultaj monatoj. Ilin impresis ankaŭ la kunigado de ĉiuj afrikaj, germanaj, sudamerikaj, kanadaj, kaj tiel plu, katolikoj dum la papa aŭdienco. "Ĉi tiu Sankta Jaro - iu el ili deklaris - aperigas plej evidente la universalan karakteron de la katolika religio. Kaj nur Romo kapablas efektivi la miraklon de popola interfratigo".

De 30 de aprilo ĝis 4 de majo okazis la nacia kroata pilgrimado, vera kredatesto de la tuta Kroatujo. Alvenis ne nur kredantoj el Jugoslavio (Kroatujo kaj Bosnio), sed ankaŭ el multaj partoj de la mondo, kiuj gastigas komunumojn de kroataj laboristoj: Germanujo, Usono, Kanado, Aŭstralio, Sudameriko. Entute ili estis 14 mil kun 17 episkopoj. La pilgrimantoj estis apartigitaj laŭ multaj grupoj, sed kunigitaj en Romo por kreda kaj frata semajno. Fakte ili povis esti multe pli nombraj; sed la organizantoj devis malpliigi la kvanton de la partoprenantoj pro la malfacila problemo de gastado. Kompreneble la alvenintoj loĝadis en pluraj pensionoj de la apudromaj urbetoj.

Ne priskribebla estis la emocio, kiam unuafoje je la dua de majo ĉiuj troviĝis kune ĉe S. Johano en Laterano post tiom da disiĝaj jaroj; je la tria por renkontiĝo kun la Papo matene, kaj vespere en S. Maria la PlejGranda.

El Aŭstralio, kiel unua pilgrimado alvenis al Romo 70 personoj, gvidataj de Mons. Launcelot John Goody, ĉefepiskopo de Perth. Ili vizitis tiukaze ankaŭ la Landon kaj poste kelkajn eŭropajn urbojn.

El multaj urboj de Hispanujo je la 6a de majo, pli ol du mil pilgrimantoj, apartenantaj al asocio de katolikaj laboristoj, la "Hermandad de Trabajadores", pere de pulmanoj, trajnoj, ŝipoj, aviadiloj aŭ privataj aŭtoj, atingis Romon, kaj precize la Bazilikon S. Paŭlo por la unua jubilea celebrado. Merkrede, 7 de majo, ĉiuj estis en S. Petro por la Papa aŭdienco, tuŝapude kun katolikoj el ĉiuj kontinentoj. Emocio religia neforgesebla, kiu ne povas esti vortesprimita!

Ankaŭ la Marŝado de la Kristana Repacigo de Asizo al Romo estis mirinda atesto de kredo kaj amo flanke de la junularo. Ĝi sukcesis altiri la konsenton de multaj personoj dum la irado, kiuj volis almenaŭ dum kelka parto

de la manifestacio kuniĝi. Kaj ne nur katolikoj kontak-
tiĝis en irado kaj preĝado, sed ankaŭ aliaj apartenan-
taj al malsamaj konfesioj. En aliaj okazoj oni vidis en
Romo ankaŭ grupojn da presbiteriaj pastoroj, da uni-
versitataj profesoroj, da episkopalianoj el Usono, gvi-
dataj de la katolika ĉefepiskopo de Vaŝingtono.

[illegible]

ABONIS KS-on 1975 (5a listo):

Ĝenovo: G.B.Briano; Milano: G. Polerani; Napolo: M.L.Russo; H.Mingo; Romo: T. Kubiak; Udine: Esp. Grupo; P. Trevisani; Vivo (SI): O. Dinetti; Aŭstrujo: J. Nagy; Brazilo: G. De Aquino; Britujo: J.Harris; Hungarujo: A. Barasevich; F. Nàdi; Jugoslavio: A. Mla-
kar; Nederlando: S.P.Smits; W.J. Visser; Pollando: L. Sobczyk; T.Kowalski; M. Rucinska; R.Kossabowski; R. Kanczyk; A. Jankowska; K. Wolnomiejska; J. A. Swiatek; M. Rogowska; J. Danowska; B. Monkiewicz; H. Borowczyk; W. Murawiecz; E. Wasilewski; I. Birczynski; P. Sodomka; J. Stryczek; L. Druszkiewicz; L. Nowak; M. Jaworski; L. Ryszard.

Entute: 428.

[illegible]

Sac. Bruno Benini, nia Samideano, ricevos gravan taskon kiel parokestro de S. Michele in San Rocco - Cesena, je 25 majo 1975. Tiuintence li petas preĝojn de ĉiuj konatoj. - Tre volonte ni kaj niaj s-anoj preĝos por li kun bondeziroj.

NI GRATULAS - nian S - anon ALES BERKA, kiu atingis
pri sia esperantista agado Oran jubileon. Precipe pro
tio ni admiras lin, ke li estis ĉiam tiel fervora en sia
aktiveco, ke ĉi tio fariĝis pasia programo de lia tuta vi
vo. Jam de la komenco li estis membro de IKUE, kaj

partoprenis fidele en multaj IKUE-Kongresoj de sia lando kaj de aliaj. Fariĝinte Ĝenerala Sekretario-kasisto de IKUE, li kapablis levi la katolikan Asocion alla plej alta ŝtupo ĝis tiam atingita, per senlaca agado, eldonado, organizado. Li devis ankaŭ multe suferi pro la politikaj cirkonstancoj. Granda bato estis por li la konfisko de la tuta stoko da eldonaĵoj, pli ol 20.000 ekzempleroj! Kaj tamen li reprenis kuraĝe sian laboron. Post la unua kongreso de li sukcese organizita en Brno, la 18a de IKUE je 1936, li klopodis, helpe de nova multmembra sekcio de li fondita, organizi en 1970 alian pli grandan komunan kongreson IKUE-KELI; sed lastmomente la lokaj instancoj, kiuj jam estis donintaj aprobojn, ne plu permesis ĝin! La grandaj idealaj entreprenoj bezonas luktadon, sindediĉon, suferojn. Sedneniu, kiel la veraj esperantistoj scias esperi kaj elteni. Al nia s-ano Ales Berka iras nia admiro kaj danko!

El la Katolika Eklezio

PROFUNDECO DE PENSOJ estas la elstara karaktero de la paroladoj de la Papo; sed ne malofte ankaŭ la vesto de la penso, ĝia esprimo, leviĝas al aŭtentika lirika formo. Ŝajnas al ni, ke unu el la plej belaj ekzemploj de ĉi tiu inspirita sento estas la parolado, per kiu li salutis la dian popolon amasiĝintan la 4an de majo en la placo S. Petro, por aŭskulti la Vikarion de Kristo:

o o o o o o o o o o o o o o o

El ĉi tiu placo ĝis nia loĝejo
 leviĝas dum ĉi tiu Sankta Jaro
 sonoj de kolektivaj preĝoj,
 voĉoj de ekleziaj himnoj,
 de glorkantanta amaso, de alvokanta popolo.

Ho, kiel profunde nin kortuŝas
 tiuj pilgrimantaj, kunpreĝantaj grupoj!
 Preskaŭ ĝemo estas tiu humila ĥoro,
 preskaŭ himno tiu trankvila aklamado.

Ŝajnas la placo atrio de l' Baziliko,
 pia kaj populara ĝia solena aspekto,
 kunveno de kredantoj en preĝado,
 samtempe familia kaj majesta.

Malfermiĝas super ni la ĉielo
 la spiritan dialogon akceptante.
 La kolonar' granita enkadrigas
 grave kaj vaste
 meditojn kaj aklamojn.

El supra balustrado cent statuoj
 rigardas kaj invitas.
 Kaj Kristo el la fortika fasado
 estras, admonas, benas.

Trafas nin la ravo de ĉi tiu spektaklo eksterkutima kaj
 tamen spontanea: ni pensas pri la insistaj admonoj de
 la Eklezio por komuneca preĝado, pri la sopirata rena
 skiĝo de la religia kanto.

Komuna noto ŝajnas resumi la sencon de tiu fenomeno :
 amaso feliĉa ~; ĉar ĝi rememorigas al ni la sagacan ri
 markon de S. Aŭgusteno: "Tiu, kiu amas, kantas". A-
 mo pura ĉi tiu estas, revanta, fluanta el la profundoj
 de la spirito; kanto, kiu ĉion esprimas: amon, suferon,
 esperon. Kaj krome kanto de popolo; ĉiu voĉo havas si
 an akcenton, de infano, de knabo, de virgulino, de a-
 dolda viro, de maljunulo...

Ĉu la popolo, do, scias ankoraŭ preĝi? Ĉu ĝi ankoraŭ
 kapablas direkti al Dio senfina, al la Patro, kiu estas
 en la ĉielo, la plej diversajn kaj alispecajn esprimojn
 de sia homa, surtera, ĝuata kaj suferata sento? Ĉu la

kredo vibrigas ankoraŭ la materion, kiel instrumenton por neesprimebla muziko? Kaj ĉu la Sankta Jaro malfermos al niatempa popolo la lipojn por preĝo, por kanto? Kaj ĉu ĉi tiu horo, tiel homa kaj mistera, redonos al la nova generacio senton de unueco, gustumon de spirito, konsolon de espero? Kion do ni diros al vi, fratoj?

Dankon!

Rava spektaklo!

"Orate, fratres!" Freĝu, do, fratoj!

Maria malfermu al ni lipojn kaj koron por preĝo nova, kaj tiel ni kunkantu "Magnificat" kun ŝi!"

o o o o o o o o o o

GRAVA DEKRETO PRI LA DEVO de la ekleziaj paŝtistoj rilate la aprobon de novaj libroj, post la necesa papara rajtigo, estis subskribita de Kard. Seper, Prefekto, kaj de Mons. Hamer, Sekretario de la S. Kongregacio por Kredodoktrino. La rajtigo okazis je 19 de marto, sed la diskonigo de la dokumento, je 10 de aprilo. Progreso en la doktrino kaj gardo de la kredo estas du aspektoj de la tasko konfidita al la Sankta Kongregacio por la doktrino de la kredo. Iam ĉi tiu materio estis regulita per la Kanona Juro (kan. 1385-1394) kun la dekreguloj de la eklezia "Indekso" sub Pio 4a (1564), reordigitaj de Benedikto 14a (1753) kaj de Leono 13a (1897). Sed la S. Kongregacio por kredodoktrino en 1956 deklaris ĝin ne plu valida kaj forstrekis la aneksajn cenzurojn. Dum kelka tempo oni konstatis danĝeran mankon de kontrolo. Sed ĉi tio preparis la kondiĉojn por la revizio de la materio antaŭvide de la nova Kodo pri la Kanona Juro. La novaj normoj estis pristuditaj kun la Episkopoj, ĉefe kun tiuj de la lokoj, kie pli intensa estis la eldona aktiveco.

La unua artikolo de la aktuala dekreto difinas la lokan Episkopon kompetenta por la aprobo. La art-oj 2, 3, 4

indikas la klasojn de la libroj, por kiuj deviga estas tiu aprobo: 2) Libroj pri la Sankta Skribo; por ilia el dono estas postulataj klarigaj notoj. 3) Liturgiaj libroj kaj iliaj tradukoj. Kompetentaj estas la Episkopaj Konferencoj; eĉ, oni deklaras, ke ili estu eldonataj nur laŭ komizio de la dirlitaj Konferencoj aŭ sub ilia kontrolo, kaj kun la rajtigo de la Apostola Seĝo. 4) Katekismoj kaj aliaj tekstoj pri religia instruado; por ilia aprobo estas kompetentaj la Episkopaj Konferencoj. Pri tekstoj. Pri tekstoj koncerne religiajn kaj moralajn studojn, ĉefe pri S. Skribo, Teologio, Kanona Juro kaj Eklezia Historio por superaj lernejoj, estas kompetentaj, laŭ cirkonstancoj, la S. Seĝo, aŭ la Episkopaj Konferencoj, aŭ la loka Episkopo.

La aprobo ne signifas, ke ĉiuj tiuj libroj devas havi la Imprimaturon; sed nur ke la aprobitaj estas garantiataj de la Eklezia aŭtoritato. El ĉi tiu klarigo oni povas kompreni pli bone la art-on 4, n.4, per kiu estas malpermesata ekspozicio, vendo, disdono de la dirlitaj libroj en la preĝejoj, se tiuj libroj ne ricevis la eklezian aprobon, ĉar per si mem tiu loko supozas ian garantion. La novaj dispozicioj rekomendas ankaŭ al la laikaj verkistoj tiun aprobon, kiam ilia laboro temas pri religiaj kaj moralaj temoj. Sed "enixe", t.e. vigle rekomendas la samon al la ekleziuloj. Pro tio, se iu verkisto volas trankviligi siajn legantojn, tiu petos la religian aprobon, eĉ se ĝi ne estus deviga. Sen tiu aprobo, kiel dirlite, la verko ne posedas la garantion de la hierarkio.

APOSTOLA ADMONO "GAUDETE IN DOMINO" (ĝoju en la Sinjoro) aperis la 17an de majo. Ĝi estis inspirita de la Sankta Jaro, kiu alportas grandan dian pardonon al sia popolo. "Meze de ĉi tiu Sankta Jaro - diras la Papo - ni opiniis, ke ni estos fidelaj al la inspiroj de la Sankta Spirito, petante de la kristanoj, ke ili revenu al

la fontoj de la ĝojo.

La Letero estas tro longa, por ke ni povu doni ĝian tradukon en ĉi tiu bulteno. Sed sufiĉas priatenti la titolojn de ĝiaj partoj, por diveni ĝian allogon:

1) Neceso de ĝojo en la koro de ĉiuj homoj. 2) Anonco de la kristana ĝojo en la Antikva Testamento. 3) La ĝojo laŭ la Nova Testamento. 4) La ĝojo en la koro de la Sanktuloj. 5) Ĝojo kaj espero en la koro de la junuloj. 6) Ĝojo por la tuta popolo. 7) La ĝojo de la pilgrimanto en ĉi tiu Sankta Jaro.

Verŝajne ĉi tiu Apostola Letero surprizos nin. Kiukuraĝas hodiaŭ, en ĉi tiu malsanktigita mondo, doni al la homoj programon de ĝojo? Oni proponas programojn de justeco, de libero, de progreso, kiuj anoncas prefere luktadojn, suferojn. Kiu ideologio aŭ kiu partio skribas en sia ĉarto ĉi tiun ne kutiman vorton? Eĉ, se ni pridemandas verkistojn, artistojn, filozofojn, ni aŭdas senesperajn vortojn (Camus, Sartre, Monod, Nietzsche, Splenger, Marx, Freud, ktp.). Kiu parolas pri ĝojo? La nuntempa mondo intense progresas pri tekniko; sed pli kaj pli ĝi kreas al si sklavecajn katenojn.

La admono de Paŭlo 6a enkondukiĝas el fundamenta aserto: "La teknologia socio kapablis multoblige plezurrimedojn, sed malofte ĝi sukcesas doni ĝojon". Kaj ni agnoskas, ke ĉi tiu distingo inter ĝojo kaj plezuro prilumas la problemon. La plezuroj sidas en la sensoj, la ĝojo en la spirito. "La ĝojo - diras la papa dokumento - estas spirita". Kiamaniere, do, la mondo, kiu ne agnoskas la spiriton, povas doni ĝojon al la homoj? La mondo kreis ĉiam pli materiajn bonojn, kiuj malpliigas laciĝon kaj helpas produktadon. Ni ne estas petataj rezigni pri tiuj helpoj; sed vera ĝojo ne estiĝos, se ni ne klopodos, por ke ankaŭ tiuj, kiuj malhavas ilin, partoprenu en tiuj ĝuoj.

Paŭlo 6a parolas pri "kristana ĝojo", kiu fontos el amo

al niaj fratoj laŭ la mezuro de la amo de Kristo al ni. La vivo de la fidela sekvanto de Kristo estas esence ĝoja, ĉar ĝi estas donaco, helpo, konsolo, amo en la nomo de Kristo. La kristana mesaĝo nomiĝas "bona anonco", ĝi kantas haleluja, kaj proklamas kun la Apostolo: "ĝoju, mi ripetas al vi, ĝoju". "Ĝoju kaj jubilu" estas esprimoj ĉiam revenantaj en la liturgio. Paŭlo 6a diras: "Ĝoju en la supernatura espero, en la atendo de la venonta bono, sed ankaŭ en la ĝojo de ĉi tiu vivo, pro ĝiaj immanentaj donacoj, kaj pro la konscio, ke Dio amas nin per nemezurebla amo".

MARIOLOGIA KONGRESO, t.e. studkongreso rilatanta la Eklezian doktrinon pri Maria, malfermiĝis ĉe la Pontifika Antona Ateneo - Viale Manzoni, 1 - de 12 ĝis 17 majo, pri temo: "La kulto al la Patrino de Dio en la jarcentoj 12-15". Por la inaŭguro de la Kongreso, en kiu partoprenis pli ol cent fakaj teologoj, ĉeestis la Kardinaloj De Furstenberg, Poletti, Suenens kaj Ottaviani, la Generalo de la Franciskanoj, P. Koser, mons. Kuraic, ĉefep. de Zagrebo (kie okazis la antaŭa Kongreso).

Oni devas fakte, kunligi ĉi tiun kongreson, unu el la plej gravaj manifestacioj de ĉi tiu Jubilea Jaro, kun la unua, organizita en Lisbono je 1967 kaj kun la dua de Zagrebo en 1971. En Lisbono oni pristudis la originojn de la Maria kulto kaj ĝian evoluon laŭ la liturgiaj tekstoj, la doktrino de la Patroj, la ekleziaj dokumentoj kaj la tradicio.

En Zagrebo, dum kongreso unuafoje okazinta en Orienta Eŭropo, kiel renkontiĝejo de la Latina kaj de la Ortodoksa Eklezioj, oni antaŭenigis la studadon pri la Maria kulto de la 5a ĝis la 11a jarcento. La Roma kongreso estas do ĝia daŭrigo.

Ĉar ne mankis en la antaŭaj kongresoj kelkaj kontraŭaj

voĉoj pri la prospero de la maria kulto en la katolika Eklezio, jam ekde la inaŭguro de la roma kongreso, rimarkis P. Koser: "Se ĉiu ajn membro de la dia popolo meritas ĉian atenton kaj respektagon, mi ne komprenas kial ne meritas tion, eĉ elstare, la Virgulino, Patrino de Dio kaj de la Eklezio. Se al ĉiu fidelulo oni aplikas la plej altajn kaj komunikigajn kun Kristo titolojn, mi ne komprenas, kial ĉi tion oni ne povas fari, laŭ la plej eminenta grado, kun tiu virino, kiun Dio elektis por kuniĝi al Kristo laŭ maniero tute aparta kaj unika".

Mons. Kuharic, la episkopo de Zagrebo, kie estis aranĝita la dua menciita Maria kongreso, substrekiĝis ĝi ajn fruktojn: la sanktejo de Marija Bistrica estis proklamita la nacia kroata Maria sanktejo; estis starigita apud la Zagreba teologia fakultato, la Kroata Mariologia Instituto por studo kaj akcelo de la Maria kulto ĉe la popolo; ĉi tiu jaro estis proklamita Maria Jaro, pro la jarmila datreveno de la morto de reĝino Helena, kiu konstruis en Kroatujo la unuan preĝejon dediĉitan al Maria. Krome la episkopo anoncis, ke en la venonta jaro okazos en Spalato la unua nacia Mariologia-Maria kongreso.

Ilustrante, poste, la temon de la roma tria kongreso pri Maria: "La Sankta Spirito kaj Maria", la sama preleganto reliefigis la vivigan agadon, precize dum la jubilea Jaro, de la dia Spirito, kiu disradiiĝas sur la mondon pere de Maria, patrino de Jesuo kaj nia.

Tuj post la konkludo de la Mariologia kongreso, okazis, 17-21 majo, en la sama loko, la Maria kongreso, kun la speciala temo: "La Sankta Spirito kaj Maria". Ĝi estis inaŭgurita per solena kuncelebrado en S. Maria Maggiore. Aldone estis aranĝitaj apud la kongresejo tri ekspozicioj: La libro pri Maria, Mariaj poŝmarkoj kaj Mariaj pentraĵoj.

KIAM LA TRIA INTERNACIA KONGRESO de la "Spirita Renoviĝo" fermis sian unuan asembleon, vespere 17 de majo, oni vidis, ke ne ĉiuj el la partoprenintoj estis junuloj, eĉ almenaŭ duono da ili estis maturaj homoj aŭ maljunuloj. Tamen, kiam en la vasta partero, inter kantoj kaj preĝoj ili levis la manojn al la ĉielo, per tiu antikva kaj ĉiam aktuala gesto, ili ŝajnis unuavide ĉiuj infanoj. Kaj ĉi tio estas prilumado, se oni serĉadis signon por vidi, ĉu inter tiuj dek mil ĉeestantoj ŝvebis la Sankta Spirito. Fakte estiĝis granda, kontaĝa ĝojo, ne komprenebla, se oni ne agnoskas ĝian devenon. Oni povis konvinkiĝi pri tio, kiel pri evidentaĵo, antaŭ ĉiu pripenso.

Kard. Suenens, kiu salutis la partoprenantojn, sin esprimis per ĉi tiuj simplaj vortoj: "Rave estas troviĝi ĉi tie". Kaj la aliaj vortoj, ŝanĝante ĉiufoje lingvojn, por esti komprenataj de ĉiuj grupoj, estis same simplaj. Iam ateista filozofo diris: "Mi kredos al kristanismo, ki am mi vidos sur la vizaĝo de la kristanoj la ĝojon pro ilia savo". Verŝajne se tiu filozofo ĉeestus tiuvespere, li kredus. Kaj li ankaŭ miksus siajn "Haleluja" kun tiuj kantataj de la amaso.

La episkopo de Malines kaj diversaj aliaj episkopoj gvidantaj la asembleon, garantiis pri la ĝusta linio de la movado.

La unuaj "pentekostanaj katolikoj" kuniĝis en 1967. Ili estis 85, kaj ĉiuj el la Universitato de Notre Dame, In dianio, Usono. Ilia celo: preĝi kune por alvoki la Sanktan Spiriton. Remalkovri tiujn donacojn tiel komunajn en la unua Eklezio, kaj tiom necesajn hodiaŭ. La preĝo estis elaŭdita. Jen kaj jen floradis novaj preĝkomunumoj, kiuj tamen estis karakterizitaj per unueca celo. La ekleziaj paŝtistoj rigardis kun intereso, aŭskultis, favoris tiun, kiu ŝajnis "Eklezia printempo". Kaj nun oni kalkulas 600.000 sekvantojn en ĉiu terparto.

La nuna kongreso atingis sian kulminon kiam la dek mil partoprenantoj kuniĝis en S. Petro por ricevi la vorton de la Papo, kun la ĉeesto de Kard. Suenens kaj de dek episkopoj. La parolado de la Vikario de Kristo akcentis la neceson de la unueco sub la gvidado de la ekleziaj aŭtoritatoj, laŭ tri principoj, indikitaj de S. Paŭlo (1 Kor. 12: 1-3). Unua: "Fideleco al la aŭtentika kredodoktrino. Tio, kio kontraŭstarus kun ĝi - diris la Papo - ne povus deveni de la Sankta Spirito. Li, kiu disverŝas siajn donacojn, estas la sama, kiu inspiris la sanktan Skribon kaj asistas la vivantan instruaŭtoritaton de la Eklezio, al kiu Kristo konfidis la aŭtentikan interpretadon de la dia vorto (v. Konst. "Dei Verbum", n. 10). Pro tio - daŭrigis la Papo - vi sentas neceson de doktrina formado pli kaj pli profunda: biblia, spirita, teologia. Nur tiu formado, kies aŭtentikeco devas esti garantiita per la hierarkio, defendos vin de ĉiuj eblaj devojiĝoj kaj donos al vi certecon kaj ĝojon esti servintaj la Evangelion, ne batante en la aero (l.c.).

Dua principo. Oni devas akcepti kun danko ĉiujn spiritajn donacojn. Vi scias, ke ĝia listo estas longa (1 Kor. 12: 4-10; 28-30) ne tamen pretendanta kompletecon. Kvankam tiuj donacoj estas por la komuna bono (1 Kor. 12, 7), tamen ili ne produktas ĝin samgrade. Tiel la Korintanoj devis aspiri al pli altaj donacoj (l.c. 12: 31), al la plej utilaj por la komunumo (14: 1-5).

La tria principo estas, en la penso de la Apostolo, la plej grava. Tio inspiris al li unu el la sendube plej belaj paĝoj de ĉiuj literaturoj, al kiu antaŭ ne longe iutra dukisto donis elvokivan titolon: "Super ĉio ŝvebas amo" (E. Osty).

Kvankam la spiritaj donacoj povas esti, kaj efektive ili estas, dezirindaj, nur la amo el karitato, la "agapo" faras perfekta la kristanon, nur ĝi estigas homon karan al Dio. Tio estas, ĉar ĉi tiu amo ne supozas nuran do-

nacon de la Spirito; ĝi implicas la sanktigan ĉeeston de la dia Persono en la koro de la kristano. Laŭ S. Fulgenco, por citi nur unu Sanktan Patron, "la Sankta Spirito povas disverŝi ĉiujn siajn donacojn, ne donante sin mem; sed li mem ĉeestas, kiam li donas amon. Ĉeestante en iu animo li komunikas al ĝi per la graco, la vivon mem de la Tre Sankta Triunuo, la saman amon, per kiu la Patro amas la Filon en la Sankta Spirito; la amon, per kiu Kristo amas nin, kaj per kiu niavice ni devas ami niajn fratojn: ne per nuraj vortoj aŭ per lango, sed per agadoj, en la vero" (1 Joh. 3: 18).

Ĉe la konkludo la Papo admonis ke, same kiel la unuaj kristanoj, ankaŭ tiuj de la "Renovigo en la Sankta Spirito", aŭ Pentekostanoj, kiel oni nomas ilin, devas ĉiam celi "ununuran koron, ununuran animon".

[illegible]

DAL MONDO ESPERANTISTA

ANTILLE OLANDESI - Aruba - Il "Trattato di Roma" è stato tradotto in Esperanto dal Sig. N. Mulders di Aruba. Con questo egli ha dato un grande contributo al lavoro del Centro-Esperanto-Europeo. Il Centro cerca ora contributi finanziari per pubblicare questo documento basilare del Mercato Europeo Comune dell'anno 1957. L'ambasciatore Ralph Harry ha elargito un premio ed è pronto ad acquistare copie del libro stampato, per il valore di 100 dollari. Chi può essere d'aiuto a realizzare la pubblicazione? Rivolgersi a: Europa Esperanto-Centro; Frederiklaan 47 - Schoorl 1719 - Olanda.

OLANDA - Il Circolo esperantista "Unueco" di Krome-
nie organizzerà per la 21^a volta, dal 3 al 10 agosto, u
na settimana di ferie internazionali. I partecipanti ver

ranno ospitati gratuitamente presso famiglie esperantiste del luogo. Pagheranno soltanto il costo delle escursioni quotidiane (Fiorini olandesi 168). Per informazioni: B.v.d. Pol.-Teresjkovastraast 15 - Kromenie - Olanda.

IL COMITATO ESPERANTISTA di Arnhem in Olanda, è riuscito ad ottenere che tre giornali locali, con una tiratura di più di 200.000 copie, annuncino la pubblicazione di un corso di Esperanto. Il corso inizierà nel mese di agosto di quest'anno e finirà in febbraio 1976.

POLONIA - Come negli scorsi anni, anche nel 1974 si sono svolti, con grande successo, i corsi per corrispondenza guidati dall'organo direttivo della Associazione esperantista polacca. Complessivamente hanno preso parte a questi corsi, nei quattro semestri, circa 5.000 persone.

Nel 1974 l'Associazione esperantista polacca ha pubblicato in 5.000 copie il manuale "Esperanto - manuale della lingua internazionale" e in 3500 esemplari il libro "Corso pratico di Esperanto".

LA CASA EDITRICE "Interpreso - Varsavia" ha pubblicato un fascicolo illustrato (tascabile) in Esperanto dal titolo "Pollando - nombroj kaj faktoj". Tra gli 11 capitoli con informazioni politiche, economiche e culturali, ve n'è uno sul "Movimento Esperantista in Polonia" scritto da Jerzy Grum. Il capitolo è di 8 pagine.

Il fascicolo si può ricevere gratuitamente rivolgendosi alla Radio Polacca (Pola Radio Esperanto - Redakcio - Poŝtkesto 46 PL 00950 Warszawa I - Polonia).

Formato 11,4 x 15,8 cm., 76 pagine, 32 illustrate.